

PREZO: 1.50 Kr.

Löjdsquint, Tjerp 1952

MALGRANDA REVUO

Nro 1 • 1952

10a JARO

ENHAVO:

	Pago
"La levpono de la deziroj", de Hans Ruhn ..	1
Sovetiaj vidpunktoj pri paco kaj kulturo, de S. Engholm	6
Poemoj, de John Francis kaj William Auld	11—12
Sur dorna diskutvojo, de J. Kohen-Cedek	13
Letero, de Nils Christensen	20
Notoj pri rimriĉo, de W. Auld	21
Literaturo	23

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas provizore kvaronjare. Prezo 1,50 kr. (inkl. sendkoston).
Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 5 rpk. —
S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 268023.
MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas
ilin afranko por resendo.

Perantoj

Belgujo: Belga Esperanto-Instituto, Oostenstr. 26, Antwerpen.
Flandra Esperanto-Instituto, Blankenberge Steenweg 72,
Brugge.

Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de
Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth
(Herts).

Danujo: Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov.
Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere, Lakse-
gade 35, Kopenhago K.

Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.

Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol,
Paris X.

Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7,
(13 b) München-Pasing.

Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.

Israel: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Jugoslavio: Sro Kralj Drago, Rozna dolina 6—22, Ljubljana.

Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.

Norvegujo: Esperantoforlaget A/S, Boks 492, Oslo.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nowa Sol.

Portugalujo: Sro A. P. da Silva, Rua 48 nro 7—3 Alvalade,
Lisboa.

Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Usono: Sro Arthur S. Kane, 725 B East Chevy Chase, Glen-
dale 5, California.

MALGRANDA REVUO

Nro 1

10a JARO

1952

"La levponto de la deziroj"

De Hans Ruin

La sekvanta artikolo estis la solena novjara parolado
en la sveda radio. Hans Ruin, devene sveda finlandano,
estas profesoro en la universitato de Lund.

Oni ofte demandas nuntempe: ĉu niaj malnovaj festotagoj
havas por ni la saman signifon kiel por la homoj de tempoj
pasintaj — ĉu povas havi la saman signifon?

Oni komprenas la kaŭzon de la demando. Pli kaj pli mal-
oftiĝas la okazoj, kiam ni povas liberigi nin de la moderna
tempomaŝinaro kaj ĝiaj senkompate pelantaj transmisioj. Pli
kaj pli maloftiĝas la momentoj, kiam venas al ni kvieto kaj
ni povas eniri en nin mem.

Sed estas ne nur tio. Ni estas multmaniere premataj.

Jam kiam Copernicus antaŭ kvarcent jaroj prezentis sian
doktrinon pri la movo de la tero kaj la ĉielaj korpoj, trakuris
la homojn ventpuŝo el la profundo de la glacimalvarmaj spacoj.
Vere ili ne bezonis plu timi la danĝerajn efikojn de la steloj,
kiel instruis ilin la astrologoj, sed ili komprenis, ke oni ne plu
povas konsideri la stelojn gardantaj okuloj de la Providenco.
Ili terurigiĝis pro la malhela indiferento de la stelaro en ĝia
brila grandiozo. Ĉio, kion la naturscienco de tiam instruis pri
la universo, nur pligrandigis nian senton de soleco kaj sen-
helpeco.

Kaj kiel aspektas la granda ludo, tiu, kiun la homoj pre-
zentas ĉirkaŭ ni — ĝuste nun kaj de longe? Ankaŭ tie ĉi
ŝajnas regi sensanĝaj leĝoj. La homo ĉiam restas si mem.

Ĉiam li ludas duoblan rolon. Jen li estas la krucumoto — la krucumito; jen li estas tiu, kiu krias: krucumu! krucumu! Jen li apartenas al la sufero, jen al la plebokriado. Apenaŭ li liberiĝis de la kruco, kiam la buŝo malfermiĝas por instigi buĉadon.

Tiu blinda, nedirektebla okazado en neniu alia tempo venas al ni tiel proksime kiel en la vintromezo. La vintra vento iras tra krepuskaj, senfoliaj arbaroj, trans glacivastojn kaj malhelaĵn akvojn. Sensenta, obstina neinfluebla elemento. Obtuzaj senvariaĵoj kun malvarma pulsado, la dezerteco mem. La senceco de ĉio ekzistanta kvazaŭ blovas rekte en niajn okulojn, internen tra niaj naztruoĵoj.

Kaj tamen! Kiam venas la novjara nokto kaj ni atendas la sonoradon de la sonoriloj, ni por momento forviŝas ĉion tion el niaj koroj. Eĉ la vorton de la Predikanto: "kaj ekzistas nenio nova sub la suno". Ni mallevas levponton trans tempon kaj spacon kaj blindajn naturleĝojn — levponton de la deziroj. Alie neniu sidus tie ĉi aŭskultante, ne la maristo sur la maro, ne la lumtura gardisto en sia turo, ne la malsanulo en sia lito, ne tiu kiu perdis sian liberecon, ne la multaj solaj en urboj kaj kamparo — nek ni, kiuj havas hejmon ĉirkaŭ ni. La koro estas infano; neniam ĝi laciĝas aŭskulti rerakontadon de malnovaj fabeloj, ankaŭ de malbonaj fabeloj kun bona fino.

Sed ĉu tio ne estas la plej vanta el ĉio vanta? La plej sensenca en ekzisto sensenca? Deziroj kaj intencoj, eble promesoj — kiom utilaj? Ni tamen ne povas influu al la okazado.

Se tio estus la sumo de niaj atingoj, tiuokaze ni ankaŭ estus atinginta la finon, nereireble. Tio signifus kovri per mortotuko nin mem kaj la tutan ekziston. Sed ni restu momenton ĉe la penso, ke la komunan situacion de la homaro formas la malgrandaj situacioj de la multaj malgrandaj homoj. Nia agado ĝuste tie ĉi kaj ĝuste nun estas parto de la sorto de la homaro. Ĉu tion ni atentis en nia ĉiutaga vivo?

Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis personon, kiu kutimas fieri pri tio, ke li estas homo "realisma", kiu materie ankaŭ havis multe da sukceso. Kiam mi sidis tie, venis metiisto kun kelkaj

libroj, kiujn li estis bindinta. La posedanto de la libroj ekzamenis la bindojn; la mieno estis ne tre kontenta. Kiam la librobindisto jam prezentis la fakturon kaj ricevis pagon, dankis kaj malaperis, la potenculo ekbrilis en sia seĝo. "Vidu, kian belan laboron li faras!" "Sed vi aspektis malkontenta", mi rimarkigis. Li ridotis sekreteplene: "Pagante fakturojn oni ĉiam devas esti ne afabla."

Jen malgranda repliko el la vivo, malgranda sed malkovra. Li, kiu sidis en la seĝo kontraŭ mi, estis ne-diranto al la vivo, al tia vivo, kia ĝi devus esti. Li transdonis sian kontribuon al la malkontento, la granda malkontento — postlasis en la menso de la alia abscesokrean dornon.

Kaj jen historio de alia speco, iom pli longa.

Amiko de mi en Helsinko dum la malfacila bombmonato februaro 1944 donis kostumon por glado ĉe fervojisto, kiu pli frue estis tajloro kaj nun akiris ekstran enspezon per iom da hejma laboro en sia antaŭa profesio. La viro, alitempe tre servema, nur hezite akceptis la kostumon. Li diris, ke bombo povus trafi lian domon, sed mia amiko respondis, ke tio povus okazi ankaŭ al lia domo, kaj tiuokaze estus ja nur avantaĝe, havi kostumon en alia loko.

Venis severa bombnokto. La domo de la tajloro ricevis plentrafon kaj ekflamis supre. Je la eksplodo li ĵetis sin supren el la ŝirmejo en la kelo por savi kiom eble de siaj posedaĵoj. Estis ne multe. Neniuj mebloj, neniuj mastrumobjektoj, neniuj litaĵoj, nur la necesaj vestoj. Kaj jen li staris frue en la krepusko en la vestiblo de mia amiko, senhejma, fulgokovrita, en ŝiritaj vestoj. Sed la kostumon, kiun li akceptis por glado, li portis sur la brako, krom la veŝto, kiun li perdis, kiam li kuris malsupren sur la ŝtuparoj ĝuste antaŭ ol la domo falis.

Mi demandis: "Diru, kio estas la antaŭhistorio de tio ĉi?"

"Nu, ĝi estas tiel sensignifa, ke mi apenaŭ volas rakonti ĝin. Kiam mi dum la militjaroj vojaĝis al Svedujo kaj poste revenis hejmen, mi kutimis kunpreni iomete da glicerino, kiun li bezonis

por sia sano, sed kiu tiutempe ne estis havebla en Finnlando. Tio estis ĉio, aŭ preskaŭ ĉio, eble saketo kun bombonoj por liaj infanoj. Kaj ni kutimis sidi kaj babili iomete, fumante cigaredon, kiam li venis por akcepti tion, kion mi kunportis. Estis ne pli."

*

Ni bezonas tiel malmulte fari, ofte ĝi kostas neniom, ĉar ankaŭ la plej malgranda povas ŝanĝi la vivon — ĝuste en tiu punkto, kie ni renkontas ĝin. Eble nur vorto, nur gesto, ne pli. Tio ofte sufiĉas. Nura rigardo povas degeli profundan froston. Sed kiel malofte ni donas tiun rigardon! Tiel neafablaj kaj avaraj ni estas. Kaj tamen ni vokas la juston kvazaŭ la fajrobrigadon, kiam la malfeliĉo atingas nin. Kaj estas pretaj kril veon pri la tuta ekzisto.

Oni diras: la grandan mondotcatraĵon ni ne ŝanĝas per afabla rigardo. Tio estas vera. Kaj tamen la tuto estas tre simpla — niaparte tre simpla. Se ni ne havas boaton por eliri por helpi, kiam ni vidas ŝipon iri kontraŭ disrompajn ŝerojn, ni povas almenaŭ flamigi fajron sur la bordo, egale ĉu oni observos la signalojn aŭ ne, egale ĉu la navigistoj surŝipe kredas nin aŭ ne. Tio estas nia afero, pri alia ni ne respondas. Nia afero estas signali, sed ankaŭ resti firme starantaj kiam bezonate. Tio estas nia kontaktpunkto kun la vivo. Kaj tiun ni perfidas, se ni permesas al malkuraĝo flustri en nian oreilon: nun mia forto elĉerpiĝis, nun miaj manoj lasas la tenon — bone forgliti, bone profundigi, bone kun fermitaj okuloj akcepti tion, kio venos kaj devos veni. Tio estus rezigni pri si mem, kaj oni havu la rajton rezigni. Sed tio estus ankaŭ perfido kontraŭ ĉio, kio ankoraŭ vivas kaj esperas.

Ĉu ne estas strange, ke tiu ĉi mondo en kiu ni vivas, tiel putra de mizero kaj bolantaj pasioj, mondo plena de malamo kaj malbeno, kie oni blekas malestimon kaj krias entuziasmon ĝis supermezuro sed tiel malmultaj ŝajnas pensi, paroli kaj agi en plej profunda senco homece — ke tiu ĉi mondo tamen ne disfalas! De kio dependas tio?

*

Ĉu vi volas aŭskulti ankoraŭ la trian kaj lastan historion — kvankam mi jam rakontis ĝin en libro?

En malfruaŭtuna tago antaŭ multaj jaroj mi estis transdononta al fiŝisto sur insuleto en la arkipelago la sciigon, ke lia filo kuŝas mortanta en la urbo. Li sidis en la dometo kaj plektis reton. Li formetis la maŝolignon kaj surhokis la reton, levis sin, staris momente senmova, ŝajnis al mi, ke li rektigas sin tiel, kiel li pli frue faris, kiam li staris sur la rokaltajo ekstere kaj volis sondi veteron kaj venton. Li peze enspiris.

— Tio do devas okazi.

Ni eliris. Survoje al la bordo li haltis ĉe kampeto, kiu ankoraŭ antaŭ nelonge estis kovrita de rampantaj juniperoj kaj rulŝtonoj. Li montris al vico da plantoj de sovaĝaj pomarboj, kiujn li trovis en la arbaro kaj mem greftis. Ni iris de planto al planto. Li klinis sin kaj ekzamenis la greftolokojn. Mi rigardis lian klinitan dorson. Estis la dorso de homo, kiu dungigis sin al la vivo kaj decidis elteni en la servo, kostu kiom ajn. Lia sola infano kuŝis senesperc malsana, mem li estis severe markita, kaj lia edzino estis maljuna kaj malforta. Sed tamen lia emo estis nur planti kaj pliperfektigi. Tie li staris klinita super la arboplanto, metis la manon ĉirkaŭ la greftolokon de la vivo. La respondo al la demando pri la senco de ĉio iam donos kelkaj florantaj pomarboj — kiam li mem jam delonge estos enirinta en la altan kaj silentan nokton.

=

Baldaŭ eksonos la sonoriloj. Ni volus vidi ĉirkaŭ ni ĉion, kio iam estis al ni kara kaj altvalora, pensojn, kiuj venis al ni, sed kiujn ni ne povis firmteni, viziojn, kiuj preterrapidis en la nebulo de nia fortomanko, rigardojn interŝanĝitajn, manojn premitajn, konfidojn ricevitajn — ĉion, kio estis kaj estus povinta esti. Sed ni rigardas ankaŭ antaŭen, provas penetri en la estonton, en la nekonatan. Ni pensu pri la multaj, kiuj fidele agas en sia loko, kiom ajn malhela aspektas la vivo, neinflucblaj de la penso pri la senfrukteco de ĉiu volado kaj

ĉiu dezirado. Dank' al tiuj nekonataj agantoj pluvivas la homaro kaj ekzistas estonto.

Ni povas fariĝi unu el ili.

Tradukis S. Engholm.

Sovetiaj vidpunktoj pri paco kaj kulturo

En Literaturnaja gazeta de la 13a de decembro 1951 troviĝas artikolo titolita "Kulturo kaj paco". La aŭtoro mencias pri rezolucio, "Pri organizado de kulturaj kunligoj", farita de Tutmonda konsilantaro por paco, kaj diras, ke kultura interrilatado estas bonega bazo por kunlaboro inter la popoloj.

"Tian kunlaboron diktas la nuntempa internacia stato, ĉar atakemaj fortoj kun intereso por milito klopodas izoli la popolojn unu de alia, malebligante al ili ie ajn renkontiĝi krom sur la batalkampo. Tiu agmaniero de la malamiko de la paco estas komprenebla. Estus por ili pli facile ĵeti la homojn en buĉadon de tria mondmilito, se la kulturaj kunligoj inter la popoloj estus detruitaj, se popoloj blinde subiĝus al la diktaturo de militaristoj, rezignus pri defendo de sia nacia kaj regna sendependeco."

"La malamiko de la paco provas kaŝi sian perforton kontraŭ la popoloj per sciencosimila frazaro kaj trompi la amasojn per helpo de la plej diversaj formoj de imperiisma kaj ŝovinisma propagando. La militinstigantoj estas armitaj per la elprovita armilo de klerigmalamo: predikado de rasa prerogativo, la homomalama "teorio" de Malthus, nacia malamikeco de ĉiuj specoj, laŭmoda amerika kosmopolitismo kaj malnova faŝista geopolitiko."

"Ekzemploj abundas. Sufiĉas mencii la libretojn de la predikantoj de malthusismo: William Vogt, "La vojo al savo" * kaj Robert Cook, "La homa fekundeco — nuntempa dilemo".

* Road to survival — noto de la trad. Pri Robert Cook mi ne sukcesis trovi informon, devis tial transskribi la nomon ne sciante la originan formon kaj povis nur traduki la librotitolon.

La unua libro, kiel konate, donas recepton pri ekstermado de centoj da milionoj da tiel nomataj "superfluaĵoj", laŭdas bakterian militon, peston, malsaton kaj ceterajn "bonfarojn", kiuj povos, tiel asertas Vogt, 'savi' la mondon de homa tromultiĝo, senlaboreco kaj krizoj. La aŭtoro de la dua libro pledas por efektivigo de duspeca 'kontrolo' de la homa plimultiĝo: 'natura' — ankaŭ per helpo de militoj, malsato, malsanoj kaj granda infanmortado, kaj 'artefarita' — per amasa steriligo de 'ne plenvaloraj', t. e. la laborista popoltavolo."

"En la libro "Milito aŭ paco" de la konata militinstiganto John Foster Dulles estas klopodate motivi la pretendojn de la usonaj imperiistoj pri tutmonda superpotenco, kaj la usona prezidanto Truman publike informas, ke la tasko de la ekstera politiko de Usono estas ligi la aliajn popolojn al 'la amerika vivmaniero'." —

Tia aspektas la ekstersovetia mondo rigardata el Sovetio. Fremduloj ofte vidas niajn mankojn pli bone ol ni mem. Se la sovetianoj havas tian koncepton pri ni — mi diras ni, ĉar kvankam ni esperantistoj ne estas militinstigantoj, ni pli malpli apartenas al la trompatoj — tia koncepto devas havi ian kaŭzon, kaj estas bone por ni ekzameni en kioma grado la asertoj respondas al la cirkonstancoj ĉe ni.

Mi lasas la ĝeneralajn asertojn. Certe ili meritas atenton, sed mi supozas, ke ankaŭ miaj vortoj pri ili fariĝus pli malpli ĝeneralaj kaj forprenus multe da loko sen doni rimarkindan rezulton. Tial ni okupu nin pri pli precize esprimitaj detaloj.

Mi supozas, ke ni ĉiuj konas la esencon de la teorio de Malthus. Ĝi ofte estis menciata en la lastaj jaroj en pritraktoj pri la homa plimultiĝo kaj la tutmonda nutrajproblemo. Kiamaŭ niere tiu teorio estas homomalama? Kaj ĉu Malthus estis homomalama? Kiu kompetenta homo volas objektivite informi nin pri tiu afero?

Ĉiokaze oni asertas, se mi ĝuste komprenas, ke la teorio de Malthus estas uzata de militinstigantoj. Ĉu la libroj — aŭ iuj el ili — pri la tutmonda nutrajproblemo estas militinstigaĵoj? En Malgranda Revuo troviĝis artikolo pri tiu temo (nro 2/1949) sed ĝi absolute ne estis militinstiga, ankaŭ ne ĝia mencio pri Malthus. Aliaj samtemaj artikoloj kaj libroresumoj, kiujn mi

legis, havis la saman karakteron. La menciitajn librojn de Vogt kaj de Cook mi ne konas. Jen unu el niaj memekzamenaj taskoj! Inter la esperantistoj aŭ inter la konatoj de esperantistoj certe troviĝas iu scienculo aŭ sciencisto, kiu estas kompetenta informi nin, ĉu tiuj du libroj efektive propagandas militon por malgrandigi la homaron kaj steriligon de la laborista popoltavolo. Se tia propagando efektive okazas, ni ŝuldas sinceran kaj tutkoran dankon al la sovetiaj informantoj, kaj estos nia nepra devo kiel eble plej vaste diskonigi la trompon. Ankaŭ estus tre bonvene ricevi informojn pri la efiko de tiuj libroj al la legantoj.

La libron de John Foster Dulles mi ankaŭ ne legis. Mi supozas, ke Usono ne rolas kiel helpanto al eŭropaj kaj aliaj landoj nur por plenumi bonfarojn. Imperiismo troviĝis kaj troviĝas pli malpli en ĉiuj grandaj nacioj, kaj estus strange, se ne troviĝus ankaŭ en Usono. Kaj Usono posedas kaj eksportas multe da aferoj, kiuj tute ne estas bonaj por la mensa higieno kaj kresko de spirita vivo, kaj kiuj ĝuste pro sia ĉiam kaj ĉiea influo efikas forte kaj grandparte malbone. Kaj tamen! La sovetianoj prave deziras, ke ni prijuĝu ilin, la sovetianojn, ne nur laŭ iliaj mankoj sed ankaŭ kaj ĉefe laŭ iliaj meritoj. Ŝajnas al mi, ke ni devas prijuĝi ankaŭ aliajn popolojn laŭ tiu principo. La demando do estas: Ĉu la usonanoj — aŭ ni diru iliaj gvidantoj — efektive laboras konsecie kaj plane por eksplodigi novan militon? Ĉu la senco de la menciita libro kaj la senco de la eldiro de Truman efektive estas, ke la usonaj ŝtatgvidantoj regu la ceteran mondon politike kaj ekonomie, faru la aliajn popolojn subuloj? Ni aŭdis la voĉon de Sovetio, kaj la voĉon de Ameriko ni ankaŭ konas. Kiu memstara, kiel eble plej objektiva prijuĝanto de la usona popola pensmaniero kaj de la celado de la usonaj gvidantoj volas doni al ni prijuĝon pri tio?

*

La aŭtoro poste montras per kelkaj ekzemploj, kiom Sovetio faris por konatiĝi kun la kulturo de la aliaj popoloj. Tiom kaj tiom da ekzempleroj estas de 1918 kaj ĝis nun eldonitaj de libroj de Balzac, Maupassant, Hugo, Heine, Shakespeare,

Kipling, Wells, Mark Twain, Jack London kaj aliaj. Mi ne bone komprenas la kalkulmanieron — ŝajnas iom stranga la informo pri 254 libroj de Maupassant, 202 libroj de Shakespeare, 615 libroj de Jack London ktp; oni ne scias, ĉu ili kalkulas diversajn eldonojn de la sama libro kiel diversajn librojn aŭ ĉu ili faris eltiraĵojn el libroj, kaj kalkulis ilin kiel librojn. Ĉiuokaze la suma kvanto de 1918 ĝis nun estas 210 milionoj da ekzempleroj. Temas pri tradukoj ne nur en la rusan sed ankaŭ 70 aliajn lingvojn de la Unio. La cifero vere estas impona, pli ol unu libro por ĉiu persono de la granda popolo. Se ni kalkulus la ekzemplerojn de rusaj libroj tradukitaj kaj eldonitaj okcidente de la rusa limo kaj en Ameriko kaj komparus ĝin kun la nombro de la loĝantoj, la rezulto verŝajne ne estus malpli bona; kompreneble granda parto el tiu nombro aperis jam antaŭ 1918, ĉar jam antaŭ tiu jaro multege da rusaj libroj estis tradukitaj kaj legataj de vastaj amasoj da homoj. Estas necese akcenti tion, ĉar la sovetia informo parolas nur pri alilandaj verkoj en Sovetio, ne pri rusaj kaj sovetiaj verkoj en aliaj landaj. Sovetia leganto povas ricevi la impreson, ke alilandanoj neniom konas la rusan kaj ceteran sovetian literaturon. Se la lastatempaj rusaj romanistoj kaj novelistoj estas malpli konataj ol Gorkij, Ŝoloĥov, kaj la malnovaj klasikuloj, tio dependas ne de malamika sento kontraŭ Sovetio aŭ la sovetia literaturo.

"Nur dum la lastaj jaroj oni montris sur sovetiaj ekranoj pli ol 50 plej diversajn filmojn, francajn, italaĵn, ĉinaĵn, hindajn, meksikajn, polajn, ĉeĥoslovakajn, hungarajn, rumanaĵn, bulgarajn, germanajn kaj aliajn." — Mi ne scias, ĉu oni povas konsideri la nombron alta, precipe se oni atentus, ke la pli multaj el la menciitaj landoj estas popolrespublikoj. Ĉiuokaze estas bedaŭrinde, ke okcidente de la sovetiaj limoj estas montrataj tiom da sensencaj kaj aĉaj usonaj filmoj kaj ankaŭ aliaj nebonaj, se la sovetia filmarto ankoraŭ konservas la kvaliton de iom pli frua tempo. Kaj des pli bedaŭrinde, kie tiu foresto de sovetiaj filmoj dependas ne de malpermesoj sed de mankanta kompreno por la alta sovetia filmarto.

Liaj ŝajne plej gravaj riproĉoj rilatas al scienco. En Sovetio oni tradukis kaj eldonis konsiderindan nombron da eksterlandaj

sciencaj verkoj. Alie agas aliaj landaj. Ili malhelpas, laŭ li, importon de sovetia scienca literaturo, malpermesas aŭ alie malhelpas al sovetiaj sciencistoj viziti alilandajn sciencistajn kunvenojn, same malhelpas al la propralantaj viziti la sovetiajn. Ekzemploj estas donitaj. Certe lia plendo ĝis certa grado estas prava. La sciencistoj en aliaj landoj havas tro malmulte da rektaj rilatoj kun la sovetiaj sciencistoj. Sed la demando estas, ĉu Sovetio mem ne kulpas iom pri tio, kondamnante alilandan sciencon kiel ilon de reakcio, imperiismo kaj kapitalismo, kaj emfaze deklarante, ke la sovetia scienco estas la sola vera.

"Gvidantaj rondoj en Ameriko, Anglujo kaj aliaj landoj de la Atlanta bloko ne allasas al la ekranoj progresivajn filmojn nek porpacajn teatraĵojn al la scenoj, malpermesas eldoni librojn de sovetiaj verkistoj. La malamikoj de la paco klopodas per fera kurteno ĉirkaŭbari 'la okcidentan civilizon', klopodas malhelpi al la popoloj reciproke utiligi la trezorejon de la tutmonda kulturo."

Tamen la sovetianoj mem ne ĉiam emas konatiĝi kun la alilandaj cirkonstancoj. En 1927 estis internacia kooperativa kongreso en Stokholmo, kaj de la Internacia Kooperativa Alianco kaj de la Internacia viringilda federacio. Multaj sovetiaj delegitoj partoprenis. En la kunvenoj ili parolis ne pri la traktataj temoj sed pri la atingoj de la rusa revolucio kaj pri la neceso por ni fari revolucion. Kiam la stokholmaj virinoj aranĝis ekskurson al la tiam novaj komunumaj lavejoj, la sovetiaj virinoj ne partoprenis. Tiajn lavejojn oni estas konstruonta en Moskva, ili deklaris, kaj tie alilandanoj povos vidi kiel oni aranĝos tiajn aferojn, sed en Svedujo oni povos konstrui tiajn nur post revolucio. Same ili reagis, kiam temis pri kooperativaj entreprenoj. Al ili ĉiuj bonaj atingoj estis nur blufoj. Tia ekzemplo estas ne escepto, kaj en la pli ol dudek jaroj, kiuj poste pasis, tiu konduto ankoraŭ pli emfaziĝis.

S. Engholm

Ombroj en mateno

De John Francis

Strangaj estaĵoj loĝas ĉi kvartalon;
antaŭ amasloĝejo maljunulo
jetas pancerojn sur la trotuaron,

distrakte de kolomba dankrukulo;
poste forplandas, ekzilita ĝis
la vespermango. Viron en angulo

ruktigas spasme alkohol' aŭ Itiz'.
Alia maĉas, ĝue kunfrotante
la botojn kvazaŭ li en paradiz'

savite festus, aŭ almenaŭ sankte
esperoflam' momentus en la koro.
Ĉu tiujn, do, espero varbus vante? — —

damnitajn jam en sia naska horo.

25

Indigno kontraŭ - - - ?

De John Francis

Ŝi sidas kun aplombo de nescio
en aŭtobuso. La vizaĝo blankas
pro pudromasko; sed kolor' ne mankas
sur ĝi, ĉar jen skarлата strio

pristridas* lipojn, kaj palpebrojn io
bluigas. Sin sinjoroj flankas
ridete — ĉar l' aspekto strangas.
Farunvizaĝ'! bizara travestio

pri belo. Tutan tagon ŝi servutis
senŝminka, turpe** pala en uzino;
al brua hejmo revenis, manĝon glutis;

* Stridi = akre siblegi. ** malbele.

sin vestis strasaŝike; de l' rutino
ekfuĝis kelkajn horojn. Nun ŝi sidas
dum porkokulaj burĝoj ŝin priridas.



Kanto

De William Auld

Donu, donu sen avaro,
Karl-Jesuo, Iljiĉ-Paŭlo,
dek regulojn por homaro,
petas ni en preĝa kaŭro.
Certe dek sufiĉas plene
gvidi glate kaj senpene
nin tra l' tuta vivo;
nin koncernas pri etiko
nek esploro nek ekspliko — —
nur definitivo.

Tro malfortas niaj mensoj,
Karl-Jesuo, Iljiĉ-Paŭlo;
ne konfuzu nin per pensoj,
petas ni en preĝa kaŭro;
sole vian cerboriĉon
kaj la propran nesufiĉon
klare ni perceptas:
tial juĝi ni ne povas
dogmojn, kiujn vi elkovas;
blinde ni akceptas.

Sed ni estas konvinkitaj,
Karl-Jesuo, Iljiĉ-Paŭlo,
malgraŭ atestaĵoj spitaj,
preĝas ni en peta kaŭro,
pri la pravo centprocenta
de l' dogmar', kaj ke solvenda
restas jam nenio.
(Se ne venkis nia kulto,
kulpas nur obstina stulto
de l' kontraŭpartio.)

Faktoj nin ne interesas,
Karl-Jesuo, Iljiĉ-Paŭlo,
kiuj vian solvon lezas,
preĝas ni en peta kaŭro,
en memfido de malklero,
kun kolero, sen tolero,
ni emfaze buŝas.

Via solvo estas prava,
absolute verohava;
la aliaj fuŝas.

Tial donu sen avaro,
Karl-Jesuo, Iljiĉ-Paŭlo,
dek regulojn por homaro,
petas ni en preĝa kaŭro.
Gajnos vi adoron dankan
pro la savaj dogmoj, kvankam
ilin ni ignoras.

La problemoj embarasas;
eĉ se via solvo strasas,
ni ĝin tuj devoros.

Rim. Devori = glutegi.

Sur dorna diskutvojo

De J. Kohen-Cedek

Sincere dirante, mi dezirus eviti la tedan polemikon pri
demando, tiel klara tuj post la militfino, sed tiel nebuliĝinta en
la konscio de multaj homoj nun, kiam mondpotencoj ambaŭ-
flanke de la fera kurteno vetkonkuras por akiri la simpatiojn
de la nova, sendependa Germanujo:

— Ĉu ĉiuj unuopaj germanoj estas kolektive culpaj pro la
krimoj faritaj de germanoj dum la lasta milito? *

Memkompreneble, ke jure kulpas sole la rektaj krimfarintoj.
Sed morale portas ĉiuj germanoj, ĉiu sian parton de respondec.

* Vidu MR nro 3/1931 — Debato.

Ĉar (1) la kliko efektiveginta la krimojn akiris la ŝtatdirektilon per entuziasma helpo de la plejmulto de la germana nacio; ĉar (2) la krimreĝimo apogis sin sur sendubaj simpatio kaj subteno de la naciplimulto, kaj ĉar (3) ĝi prezentis en siaj agoj, ĝenerale, la dezirojn, aspirojn kaj interesojn de la popola plimulto. Ĉar (4) tiu reĝimo realigis la krimojn tute oficiale kaj (5) per rimedoj de la tutgermanuja ŝtataparato, (6) per aktiva helpo de amasoj da ekzekutantoj, (7) je plena kontento de amasoj da profitantoj kaj (8) kun muta konsento de amaso da observantoj. Ĉar (9) la krimoj estis farataj je la bono de la "eternaj historiaj naciaj intercoj" de Germanujo, kiel kutimis proklamadi la estroj de la tria miljara regno. Ĉar (10) la krimoj estis farataj en la nomo de, sencescepte, ĉiuj germanoj.

En tiu ĉi senco portas ĉiuj germanoj la krimrespondecon kaj ŝuldantecon pri rebonigo.

Konsciante pri ili la germana Bundeskanzler, dro Adenauer, solene proklamis 27/9 1951: "... Im Namen des Deutschen Volkes wurden unaussprechliche Verbrechen begangen, die uns die Pflicht auferlegen, den Opfern moralische und materielle Genugtuung zu leisten ..." (En la nomo de la germana popolo estis farataj neesprimeblaj krimoj, kiuj devigas nin morale kaj materie rekontentigi la viktimojn.)

La proklamon prezentis al la parlamento en Bonn la Alterspräsident sro Paul Loebe, en la nomo de ĉiuj germanaj partioj. Se la regnestro decidis pri rebonigaj pagoj, ili estos pagataj el la ŝtatfinancoj, akirataj kutime per tributoj, kiujn pagas sencescepte ĉiuj pagodevaj civitanoj, eĉ tiuj ne partoprenintaj la krimfarojn.

En tiu ĉi senco la respondeco estas same kolektive-komuna kiel la krimoj.

Sed dro Adenauer eraras, se li opinias konvinki la obstinulojn de tipo pli katolika ol la papo. Sro J. W. Leslie estas verŝajne pli kompetenta pri germanaj problemoj ol la ŝtataŭtoritatuloj en Bonn. Kaj li ne ŝparas absurdajn argumentojn: "Neniu tuta nacio respondas pri la faroj de ĝiaj soldatoj (sic!) kaj

aliaj nehomigitaj civitanoj" (!). Kvazaŭ armeo ne estas ŝtatforto bazita kaj organizita laŭ principo de obca respondeco (disciplino) rilate al ĝia estraro, siavice respondeca antaŭ la ŝtato, kiu morale respondas antaŭ la tuta kulturmondo kaj la historio. "Soldato — nehomigita civitano" — originala difino! Kvazaŭ ĉiu unuopa armeano ne karakterizas la medion, kiu mobilizis lin!

Tamen povas okazi eĉ tio, kaj eĉ en armeo de altcivilizita popolo. Ekzemple — majoro Roy Farran, la teruremulo de la stratoj en Jerusalemo, heroo de la fifama CID (Criminal Investigation Department), la brita politika spionaro. La cinika sadisto R. Farran interalie pro plezuro mortiginta senkulpan junulon, post la murdo kuraĝe fuĝis al Sirio por kaŝi sin de la rezisto, sed li estis revokata de CID, post kiam ĝi artifice detruis ĉiujn krimpruvojn. La lertkombinita militjuĝa farso lin pompe senkulpigis, kaj Roy Farran revenis kiel venkinto al Anglujo kaj eĉ estis akceptata en Buckingham Palace. Sed Farranoj estas produkto de spirite traputrinta socimedio, kaj ili estas esceptoj en la brita armco! — pri tio senrezerve, honeste atestas mi — iam senkompata batalanto kontraŭ la malicaĵoj CID-anoj.

Responde al piko kun adreso al israela rezisto, mi ne dezirus interŝanĝi komplimentojn kun britaj samideanoj. Pro tia konduto mi foje perdis, bedaŭrinde, la amikecon de bluokula angolino kun ĉarmaj vangokavetoj... La aferoj apartenas al la pasinteco. Precipe nun, kiam la angla registaro tiel fundamente ŝanĝis sian rilaton al mia lando, konsiderante ĝin povebla kunlaboranto en nia mondangulo. Kial do ni disflamigu la estingiĝantajn pasiojn? La realaj bezonoj diktas: Pasinta doloro — for el la koro!

Sed vere ĉagrenas, kiam oni naive kredas, ke dum la sangavidaj teroristoj pafis per kugloj, la bonkoraj Tommies nur okulpafis, ke dum la gangsteraĵoj ribelintoj ĵetadis bombojn, la fortoj de generalo Barker ĵetadis nur petardojn kun mildadmonaj proklamoj. Ambaŭ flankoj kaŭzis unu al la alia multajn suferojn, larmojn kaj doloron, sangon kaj koton — comme à la guerre. Sed, se partopreninto povas esti objektiva juĝanto — kredu min: pli kavalirocan konduton — kiel en

ĉiuj liberig militoj — manifestis ĝuste la liberigbatalantoj. Ĉar alta idealo ĉiam plimoraligas la adeptojn. Pri tio atestis en libroj kaj artikoloj multaj gazetkorespondantoj el ambaŭ kontinentoj, inter ili mondfamaj verkistoj.

Sro D. B. Gregor estas, verŝajne, korprofunde ofendita, ĉar mia popolo sendanke rezignis la grandan honoron vegeti sub la brita protektado. Memoru li, ke neniu invitis la anglojn "krei araban-judan Palestinon". La Ligo de Nacioj konfidis al Britujo mandaton krei ĝuste judan hejmon en lando ĵus libera de la turkoj per helpo de judaj armeformtoj. Sed Britujo pro siaj imperialismaj interesoj falsis la taskon, flegante kaj edukante araban ŝovinismen, subtenante araban enmigron, malpermesante la judan, kaj kreis dunacian antagonismon por havi pretekston lasi la landon en sia posedoteno. Memoru li, ke nur dank' al la politiko de "fermitaj pordoj" multaj centmiloj da judoj, ne povintaj rifuĝi el Eŭropo (1942—1944), fariĝis viktimoj de hitleraj masakroj. Ĝuste tio elvokis la ribeleksplodon. Kaj la agoj de Irgun Ecel, sro J. W. Leslie, estas samgrade riproĉindaj kiel la liberig militoj de Jeanne d'Arc, de Garibaldi, Kosciuszko, de Valera kaj la ceteraj, sen kiuj la tuta mondo, preskaŭ, restus enkatentita.

Sro D. B. Gregor en siaj rimarkigoj publike demonstras plenan neinformitecon pri la koncernaj problemoj. Prezente paralele la germanajn militkrimojn kun la judaj "kruelagoj" en Israel kaj komparante ilin, li penas pruvi, ke ambaŭ egalas. La intenco mem atestas pri plena manko de sento pri proporcio (pli ol 6 milionoj da turmente masakritaj viktimoj sur unu flanko kontraŭ kelkaj centmiloj da rifuĝintoj sur la alia), kaj ĝi malkaŝas la ankore radikintan malfavoren de la aŭtoro al la eta israela popolo, batalinta por sia ekzistrajto. Sed lia malbonintenca formulado ĝenerale falsas la bildon.

Li skribis: (1) "Germanujo volis forpeli kaj fakte forpelis multajn milojn da judoj; Judujo kaŭzis, ke multaj miloj da araboj devis forlasi siajn hejmojn kaj vivi senespere en la najbaraj landoj." — Ĉu la germanoj nur volis? Ĉu nur

forpelis? Ne, ili dispafis, buĉis, sklavlaborigis, turmentis, forbruligis kaj sapigis. Ĉu nur multajn milojn? Ne, ĝis 7 milionoj! Ĉu la judoj forpelis la arabojn? Ne, la angloj kun egiptoj kaj irakanoj admonis ilin foriri de la kontraŭa flanko, por plimultigi la nombron de batalantoj. Kaj kiu poste forturnis sin de respondeco? — La instigintoj mem.

(2) "Germanujo metis sennombran aron da judoj en koncentrejojn; Judujo lasis al la arabaj rifuĝintoj nenian vivrimedon krom tiu, kiun kompatplenaj registaroj starigis . . ." Ĉu la germanoj nur metis? Ne, ili ekstermadis ilin tie. La travivintojn poste (1945—1948) tenis ĝuste la angloj, tenis kiel en malliberejoj — ĝis la sendependa Israel ilin liberigis. Kaj la arabajn rifuĝintojn subtenas, inter ceteraj kompatplenaj registaroj, ĝuste Israel, per proporcio tre alta sumo. Israel konsentis elpigi al ili la tutan prezon de ilia perdita havaĵo, por ke ili koloniigu en la vastaj arabaj landoj, kondiĉe ke la lastaj subskribu la paktrakton. Sed tiuj rifuzas. Ĉu sro D. B. Gregor ne sciis pri tio aŭ nur ŝajnigas nescion?

(3) "Germanujo detruis Lidice . . . Judujo atakis la araban vilaĝon Dir-Jasin kaj mortigis ĉiujn loĝantojn." Mi ne prikskribos la nigran bildon de la kompleta mortigo de ĉiuj loĝantoj en Lidice. En Dir-Jasin loĝis pli ol 600 homoj. Duono el ili obeis al la averto de Ecel per sonlaŭtigilo kaj forlasis la vilaĝon antaŭ la komenco de la surstrata batalo. El la ceteraj 78 virinoj, infanoj kaj maljunuloj estis kaptataj, portataj al neŭtrala zono kaj liberigataj. La resto falis: 154 batalantoj kun centoj da virinoj, maljunuloj kaj infanoj, kiujn trafis la sorto de stratbatalado kaj podoma konkerado en kondiĉoj de reciproka kuglopluvego, ruiniĝantaj domoj kaj eksplodoj. Tiu centoj da civilaj viktimoj konsternis nian propran publikopinion. Sed trairinte la prismon de la malamika gazetaro kun certtendenca komentario ĝi elkreskis en la konscio de D. B. Gregor ĝis la mezuroj de Lidice. Tamen Lidice estis nur epizoda germana krimo, dum Dir-Jasin estis la maksimuma peko de Ecel. Ĉu la komparo estas ĝusta? Ĉu la ekzemploj estas kompareblaj?

(4) "Germanujo ekzekutis la senkulpan van der Lubbe; Judujo embuske murdis la senkulpan grafon Bernadotte."

Ankaŭ ĉi tie uzas sro D. B. Gregor la ruzan melodon de "pars pro toto", kvazaŭ la murdo de v. d. Lubbe estus la sola krimo de la germanoj kaj kvazaŭ la murdo de F. Bernadotte estus ago aprobita de la israela publikopinio. Ĉiuj scias, kiel malice ĝojis la germana gazetaro pri la murdo de v. d. Lubbe. Sed same scias ĉiuj, kian grandan indignon elvokis en nia lando la perfida murdo de la sveda nobelo reprezentanta ĉe ni la Unuigitajn Naciojn, murdo ekzekutita arbitre de iuj senrespondaj personoj, kiuj dank' al la kaosa landstato sukcesis kaŝi sin kaj evitis la punon. Absolute ĉiuj niaj sociaj kaj politikaj grupoj, partioj, gazetoj kaj organizoj kun profunda kaj sincera indigno traktis la murdintojn. La kontraŭuloj de la plej ekstrema rezista grupo — Lehi — akuzis ĝin, ke ĝia gazetpropagando kontraŭ la planoj de grafo Bernadotte provokis la senrespondajn elementojn. Densa suspektombro falis sur la rezistekstremon, kiu tiam ankoraŭ ne estis enigita en la komunan landan armeon. La registaro faris drastan paŝon; ĝi proklamis Ecel kaj Lehi eksterleĝaj kaj postulis ultimate ilian tujan kapitulacion. Por ne elvoki civilmiliton la nomitaj grupoj cedis. La postaj parlamentelektoj alportis al ambaŭ malvenkon: la senbaza murdsuspekto forrabis de ili la simpation de la vastaj popoltavoloj. Jen kial en la israela ŝtatvivo venkis la moderaĵaj elementoj, kies rolo en la landliberigo estis malpli decida ol tiu de la ekstremuloj. La nomitaj grupoj pagis fremdan ŝuldon.

Malgraŭ ĉiuj eblaj rebonigoj proponitaj de nia flanko la sveda registaro rifuzis rekonaprobi Israel, ĝis ilia speciala sendito, esplorinto surloke la veran staton de la murdafero rehonorigis nian ŝtatestron kaj la publikon. Sed sro D. B. Gregor estas ja pli pia ol la papo . . .

(5) Sro Gregor akuzas nin pri nesatigebla avido al fremdaj teritorioj. Ĉu ni uzurpis egiptajn, siriajn aŭ irakajn regionojn? Ne, tute kontraŭe: la egiptoj ankoraŭ okupas la marbordon de Gaza, kaj la antikva parto de Jerusalem — nia plej granda sanktejo — ankoraŭ troviĝas en posedo de operele rekvizito-provizita "reĝolando", posedanta nenian socian, politikan aŭ ekonomian ekzistoneceson, nek viveblon, krom ĝia duba tasko priservi la britan strategion. Ĉi estas bufera, artefarita ŝtato,

etendiĝanta tuta en la geopolitikaj kadroj de nia historia hejmlando. Sed ni tamen aprobis tian artefaritaĵon por eviti militadon. Ĉu tio estas iredentismo? Eĉ pli: en 1948 ni konsentis pri pli nenaturaj spacomankaj limoj (kun 5 inklavoj) laŭ plano de UNO, konsiderante, ke pli taŭgas ricevi kripligitajn kadrojn sen sangoverŝo ol normalajn limojn per manu militari. Sed sro Bevin ne konsentis kaj provokis la najbarojn invadi. Sekve de tio ni plirektigis la limlinion, nuligante la inklavojn. Sed laŭ Gregor nia konduto estas komparebla kun la germana "Drang nach Osten". Dankon pro flatkomplimento!

Fine, pri la demando de sro Gregor, ĉu la israelandaj araboj posedas (laŭ mi) ribelrajton. Laŭprincipe ĉiu ribelmilito estas pravigebla, atestante pri malkontento de la koncerna popolo pri sia superreganto. Ĉiu medio rajtas mem mastri pri sia sorto, kaj ribelante ĝi manifestas sian memkonscion kaj maturecon. Esceptoj ne malverigas la regulon. Sed ribeloj ne estas bezondiktataj en normoj de demokrata ordo, kie la konstitucio kaj la ŝtatpraktiko certigas la aŭtonomiajn rajtojn kaj privilegiojn de la minoritatoj... Sro Gregor do estu certa, ke la israelaj araboj (preskaŭ 10 % de la loĝantaro) ne ribelos. Ili estas plene egalrajtaj civitanoj (kvankam en kelkaj surlimaj vilaĝoj la loĝantoj pro sekurkaŭzoj ne rajtas libere vojaĝi sen policpermeso). Ili posedas propralingvan juĝon, policistaron, propran komunuman aŭ urbestran administradon kaj privilegian plenan liberigon de armeservo (por ne devi iam militi kontraŭ samnaciaj najbaroj). Ili aliĝis al la landaj laborprofesiaj unioj kaj akiris liberigon de siaj feŭdaj ŝeĵoj, altan laborpagan normon, laborprotektion, laborasekuron kaj anecon de malsanula kaso. Ilia vivnivelo altiĝis, la higien- kaj sanstato pliboniĝis, ĉar ili ekuzis sapon, dentobrosojn kaj eŭropajn vestojn. Fine, la israelaj araboj estas la solaj araboj ricevintaj devigan kaj senpagan lernejon, propralingvan, memkompreneble. La edziĝoleĝoj kaj la herednormoj restis en la kompetenco de ilia religia juĝistaro. La gvidantoj de iliaj partioj sidas elektitaj en la landa parlamento kaj eĉ aliĝis al la regnestra koalicio. Eble tio lasta kontentigos sron D. B. Gregor. Dixi et animam levavi.

Letero

al mia kunkristano Rudolf Anders

Ne estis por mi ĝojiga legado la respondo de Rudolf Anders al Kohen-Cedek en nro 4/1951 de MR.

Li prezentas kristanojn kiel idealistojn, sed judojn kiel materialistojn. Ĉu li forgesis, ke Zamenhof estis judo?

Materialismo aperas, li diras, en la Malnova Testamento, kiu — bedaŭrinde, laŭ la opinio de Anders — estas kunligita kun la Nova Testamento.

Mi citu la vortojn de Jesuo pri la Malnova Testamento laŭ Mateo 5,17: "Ne pensu, ke mi venis por detrui la leĝon aŭ la profetojn. Mi venis ne por detrui, sed por plenumi."

El la Malnova Testamento mi citas jenon, kion Jesuo publike laŭdis, el Levidoj 19, 18: "Ne faru venĝon kaj ne portu koleron kontraŭ la filoj de via popolo. Amu vian proksimulon kiel vi mem. Mi estas la Eternulo." La vortoj parolas por si mem.

Bedaŭrinde Anders ne estas taktoplena en sia polemiko kontraŭ samideano Kohen-Cedek.

Li kritikis, ke la filino de Kohen-Cedek estas fotografita en Heroldo kiel armita. Kompreneble mi kiel esperantisto malamas la militon, kaj mi estas ankaŭ aktiva membro de la pacorganizado UL. Sed se rabistoj enirus perforte en mian domon kaj patrujon, mi volus elĵeti ilin eĉ per armiloj, ĝojante pro helpo de edzino kaj filino.

La modernaj judoj venis en Palestinon ne kiel atakantoj. Ili estis tre utilaj enmigrintoj, ili kulturis la malzorgitan landon, ili donis laboron al malriĉaj araboj, kiuj iam konkeris kaj malzorgis la judan patrujon.

Ĉu estas necese menci, ke iuj judaj fanatikuloj en milita tempo murdis grafon Bernadotte, ĉar ili opiniis, ke lia propono forprenos teritorion de ili. Israel publike petis pardonon pro la murdo. Mi nek povas nek volas senkulpigi ilin. La grafo estis nobla persono, kiu volis nur helpi kaj repacigi la batalantojn. Ni norvegoj ŝuldas tre grandan dankon al li, ĉar li savis multe da norvegoj el kruelaĵoj kaj morto en Germanujo. La hitleranoj torturis kaj murdis multe da bonaj norvegoj kaj rabis ĉiujn valoraĵojn de nia lando. Sed tion ni ne diras al

niaj germanaj samideanoj. Tio estu forgesita. Ni devas ne diskuti pri niaj religioj, sed ni preĝu kun Zamenhof sub la verda standardo:

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,
antaŭen kun pacaj armiloj!
Kristanoj, hebreoj aŭ mohametanoj
ni ĉiuj de Di' estas filoj.

Nils Christensen, Norvegujo.

Notoj pri rimriĉo

En MR 3/1951, p. 14, s-ro M. C. Butler skribas: "Mi... hezitus diri, ke esperanto estas 'supermezure riĉa je rimoj'. Klare, lingvo 5.000-radika ne povas rime konkuri kun lingvo 50.000-radika."

Pardonu, la afero ne estas tiom klara. Apriore, oni povas supozi lingvon 50.000-radikan, en kiu neniu radiko rimas kun alia, kaj ankaŭ lingvon 5.000-radikan, en kiu ĉiu radiko rimas kun ĉiu alia. Verŝajne nek unu nek alia tia lingvo ekzistas; tamen ni trovas fakte, ke la rimriĉo aŭ malriĉo de iu lingvo dependas ne de la nombro de radikoj, kiujn tiu lingvo posedas, sed de tute aliaj faktoroj. Kvankam el la lingvoj eŭropaj la angla havas la plej grandan radikaron, ĝi estas malpli riĉa je rimoj kaj rimebloj ol ekz-e la franca, hispana, itala kaj germana lingvoj. Ĝi estas ankaŭ malpli rimriĉa ol la antikvaj latina kaj greka lingvoj, kiuj estis nekompareble malpli vortriĉaj — kvankam la latina kaj greka lingvoj malmulte eluzis siajn rimeblojn (pro kaŭzoj, kiuj nun ne koncernas nin).

Ni pripensu jenajn du citaĵojn:

"En la greka kaj latina lingvoj, kiuj estas altgrade fleksiaj kaj ŝarĝitaj per identaj finaĵoj indikantaj kazon, sekson, nombron, tempon kaj modon, rimado estas facila... En la angla, rimoj estas relative maloftaj... Parte pro la hibrida origino de la angla kaj parte pro siaj multspecaj formoj, (la anglaj) vortoj, precipe la anglosaksa, kiuj formas la kernon kaj grand-

parte la esencon de (la angla) poezia vortprovizo, posedas pli grandan variecon de finaĵoj ol la vortaroj de malpli miksitaj kaj pli unuformaj lingvoj. Efektive, ĝuste pro tio, ke vortoj povas havi pli variajn finaĵojn en la angla, rimoj estas tiom pli raraj en tiu lingvo. Kontraŭe al rimoj en lingvoj altgrade fleksiaj, kies gramatikaj finaĵoj senĉese reokazas, kaj en lingvoj kiel la itala kaj hispana, en kiuj la samaj vortkategorioj ofte ricevas la samajn sufiksojn, anglaj rimoj malofte okazas nur pro fleksioj kaj ordinare okazas ĉe vortoj apartenantaj al malsamaj kategorioj." *

"Jen kelkaj vortoj pri la specialaj problemoj de tradukado el la ĉeĥa en la anglan. Kun escepto eble de la litova, la ĉeĥa estas hodiaŭ la plej altgrade fleksia lingvo de Eŭropo, eĉ pli ol la rusa. La angla, aliflanke, estas la malplej fleksia eŭropa lingvo. En la ĉeĥa, sekve, vortoj kiuj ne rimas en nominalivo eble rimas en aliaj kazoj; similaj aŭ identaj sufiksoj povas okazigi rimojn, k. t. p. . . . mallonge, rimobloj estas senfine pli multnombraj en la ĉeĥa ol en la angla." **

Certe ne necesas, ke mi komentariu la suprajn argumentojn. Oni vidos senpene, ke rimriĉo do ne dependas de vortriĉo.

Se ni pripensas la grandajn rimkategoriojn: -ad, -ak, -al, -am, -an, -and, -ant, -ar, -at, -e, -ed, -el, -en, -ent, k.t.p., k.t.p.; kaj se ni pripensas ke, kiel mi jam skribis en alia artikolo, preskaŭ neniu vorto estas balasto en nia rimvortaro . . . ni eble konsentos, ke nia lingvo estas riĉa, eĉ supermezure riĉa, je rimoj: pli rimriĉa ol la 50.000-radika angla lingvo.

Ĉar la rimriĉo de esperanto dependas unuavice de la naturo kaj strukturo de la lingvo.

W. Auld.

* A. M. Clark, M. A., D. Phil.: "Studies in Literary Modes" (1946), p. 180, 185-6.

** E. Osers kaj J. K. Montgomery: "Modern Czech Poetry" (1943), p. 11.

Literaturo

Henrik Ibsen: Peer Gynt.
Tradukis: Erling Anker Haugen.
Prezo 10,50 norv. kr, bind. 13.
Eldona Rondo, Trondheim, Norvegujo.

Pro sia propra literatura valoro kaj pro siaj kvalitoj de traduko tiu ĉi libro apartenas al la ĉefverkoj de la esperanta tradukliteraturo. Mi supozas, ke ne estas bezonate paroli pri la verko mem. Jen miaj impresoj de la traduko.

Sro Haugen havas ĉiujn kvalitojn, kiuj estas necesaj por tia laboro. Li vere scias kaj kapablas uzi nian lingvon, kaj ĝi estas plenviva por li ankaŭ kiel verkarta lingvo. Li komprenas la verkon, kiun li tradukas, perceptas en la originalo la mil kaj mil detalojn de diversaj specoj, kiujn bona tradukanto de tia verko nepre devas percepti. Li havas en si tiom da poezio kaj poezia kreopovo, kiom la traduko de tia verko postulas. La morto de Ase, la sunsubiro inter la montoj de Rondan kaj aliaj poezisaturitaj partoj impresas al mi same forte kiel la originalo. Li havas ankaŭ la humoron kaj la humorespriman kapablon, kiuj estas necesaj por fidele redoni Peer Gynt. Certe mi povus citi ankoraŭ multajn kvalitojn, sed unu sufiĉu: li estas ĉiam fidela kaj humila servanto al la verko, al kiu li dediĉas sian laboron.

Mi ne konas Haugen sed parolas laŭ la atestoj de la traduko mem. Ĝi surprize fidele redonas la tekston de la originalo. Kiam ne estis eble rekte traduki vortojn kaj esprimojn, li ĉiam trovis aliajn, kies senco kaj impresforto egalas al la originalo. Ankaŭ la vivo de la originala lingvo transfluis en la tradukon. La lingvo en Peer Gynt estas ne tiu de klasika deklamdramo, sed ĝi estas en plej bona senco ĉiutaga lingvo, ĝenerala popola lingvo, vigla, esprimoŝrapa, iranta rekte al la celo sen artefaritaj ornamaj ĉirkaŭvojoj, ĝi havas la poezion de naturproksima sed vigla spirita vivo, kaj ĝi havas multe da humoro. Tio troviĝas ankaŭ en la traduko.

Kompreneble troviĝas detaloj, kiuj ŝajnas aŭ estas ne kontentigaj, sed en rilato al la tuto ili estas tre malmultaj kaj preskaŭ sensignifaj. Verŝajne ne estas multe da senco en

recenza listigo de tiaj aferoj, sed mi tamen mencias kelkajn.

Mi ne estas certa, ke la esprimo "esti si mem sufiĉe" (p. 63 kaj aliloke), estas klare komprenebla al homoj, kiuj ne antaŭe konas ĝin. Oni eble povas interpreti ĝin tiel, ke ĝi signifas ne memsufiĉecon sed memfidelecon, esti si mem kontentige. — "ekoscedas por spiri" (p. 12) ŝajnas al mi ne bona esprimo por forta aŭ pena enspiro pro granda ekscitiĝo, malgraŭ la simileco al oscedo, ĉar vole nevole oni pensas pri laceco. — "pugnabatalo" (p. 16) — "Kaptu lin — ĉe vido de li (13)" originala teksto: Kaptu lin, se vi povas trovi lin; "de li" rimas kun "ĉe li", sed malgraŭ tio la linio ne ŝajnas al mi aprobebla: "Jen, per tiu ĉi tenajlo fleks-teniĝis la kanajlo" (18); fleks-teniĝis anstataŭ estis flekstenata (kaj sur p. 17 batiĝis anstataŭ estis batata) ŝajnas pravigebla ne pro la verso sed pro ĝia funkcio en la parolo de la koncerna persono. Ĝi donas nuancon, kiun ni alie ne havus. — "Dum vi sur Gendin kure rajdis bokon pel-susure" (20); originala teksto: Dum vi en Vesterfjellet rajdis sur bokoj (virkaproj) tra la aero. "pelsusure" ne plibonigas la simplan esprimon de la originalo kaj estas tro literatura en la buŝo de Ase. — "Nun ni ludu 'Peer kaj boko', — mi — la boko, vi la Peer!". Eble tio iom malfortigas la esprimmanieron, sed tamen ekz. "kaj vi Peer" ŝajnas al mi pli bona ol la sensenca artikolo. — "Okazis al mi! — Tion faras ja ĉio!" (39) La senco de la lasta frazo estas: "al vi okazas ja ĉio", kaj "faras" certe estas tro nacilingva. — "Ne, Dio min punu, se vi tuŝu la knabon!" La originala "se vi ricevos permeson" povus ŝajne pravigi "tuŝu", sed la esperanta formo tamen aspektas tro nelogika, kaj "tuŝos" bone taŭgas. — "ĉiu ajn" (46, simile aliloke). Kiel mi iam rimarkigis en Lingvaj sugestoj, la vorto ĉiu indikas ĉiun unuopan; tial estas sence aldoni al tia vorto la partiklon ajn, kiu havas funkcion nur antaŭ kiu, iu ktp. — "Do tiel la afero finis" (103 kaj aliloke). La tradukanto certe konscie uzis la transitivan formon por la netransitiva senco, tamen tia uzo estas danĝera, eĉ kiam temas pri poezio. — Mallongigo de la germana von skribita per majusklo verŝajne estas skrib- aŭ preseraro, grampus sur 118 preseraro. "Kiel levas — jam esti la celon metinta, kaj efektiviĝi ĝin ŝtala kaj flinta" (141). La originalo

diras: Kiel tio estas levanta (la sentojn, la animon) meti al si celon kaj efektiviĝi ĝin kiel siliko kaj ŝtalo. "ŝtala kaj flinta" en la traduko evidente rilatas al subkomprenita "oni" sed logike ĝi povus rilati ankaŭ al "ĝin", kiel rezultaj kvalitoj de la efektivigo. La esprimo do aponaŭ estas kontentiga. Pro la norvega "flint" la esperanta "flinta" povas esti pensoglito; se ĝi estas intence uzata, laŭ la signifo en Pl. V., ĝi ŝajnas tro speciala kaj tro fremda en sia nova medio.

Jen mi donis kelkajn specimenojn de detaloj, kiujn mi ne aprobas; tamen mi per ili neniom forprenas de la aprobo, kium mi antaŭe faris.

La volumo enhavas krom Peer Gynt koncizan komenton pri la verko, rimarkigojn pri vortoj kaj esprimoj en la teksto, liston pri vortoj ne trovblaj en Pl. V. kaj tri mallongajn norvegajn popolfabelojn, kiuj celas doni la spiritan grundon el kiu kreskis la figuro Peer Gynt. La libro entenas sume 258 paĝojn en formato 12,5×19 cm, tipografio kaj papero estas unuaklasaj. Kaj atentu; la prezo efektive estas malalta!

S. E.

Fernando Rey: Rui Barbosa.
Tradukis Jozefo Joels.
Eld. Domo de Rui Barbosa.

Domo de Rui Barbosa estas muzeo-biblioteko starigita al la memoro de la brazila eminentulo, kiu portis tiun nomon. La efektiva eldonanto de la libro Rui Barbosa estas tamen la brazila ministerio de edukado kaj sano. Ke la brazila registaro konsentis pagi la eldonadon de tia libro, kies pretigo certe kostas ne malmulte da mono, dependas siavice kompreneble de la fervora kaj senlaca laboro de la brazilaj esperantistoj.

La libro estas grandformata kaj havas preskaŭ 300 paĝojn. Krome troviĝas en ĝi dek tutpaĝaj fotoilustraĵoj sur aparte enmetitaj folioj. La papero estas la plej bona kaj la tipografio estas arta.

Rui Barbosa naskiĝis 1849 (la libro estas eldonitata kaŭze de la jubileo) kaj mortis 1923. Profesie li estis advokato, sed la plej grandan parton de lia tempo certe okupis lia laboro por socio kaj humanismo. Li estis redaktoro, verkisto, poli-

tikisto kaj multe pli. En ĉio lia strebado celis al justo, homoco, kulturo. La leĝo (kiel esprimo de vero) kaj respekto al la leĝo estis por li la fundamento por orda, harmonia socia vivo, nacie kaj internacie. Li estis impona kulturpersono, kaj lia signifo por Brazilo certe estis kaj estas grandega. Li estis konata kaj signifa ankaŭ ekster sia hejmlando. Li estis la unua kiu publike defendis Dreyfus, kaj li estis honora prezidanto de la packonferenco en Haag 1907, laŭ la libro ŝajne la plej eminenta kaj klare celkonscia el ĉiuj delegitoj.

La libro pri Rui Barbosa estas biografio eseo (ampleksa eseo efektive) pri la vivo de tiu granda brazilano. En la komenco troviĝas enkonduko, en kiu la aŭtoro ĝenerale traktas la diversajn aspektojn de la personeco kaj signifo de Barbosa. Almenaŭ nordeŭropa leganto povus en tia traktaĵo vidi nuran panegiron, kaj se li trovas similan skribaĵon pri sialanda eminentulo, li rigardus ĝin kiel sengustan flatadon eĉ ofendan al honesta kaj sinceranima animgrandulo. Sed ni bone komprenas, ke la panegireco dependas de la elokventeco de la portugala lingvo kaj de tiuj, kiuj parolas ĝin. Poste venas la biografio, kiu konsistas el koncizaj informoj de la aŭtoro kaj cetere grandparte el citaĵoj el skribaĵoj kaj paroladoj de Barbosa mem, kiuj en plej bona maniero prezentas la faktojn, kiujn la biografio celas doni. Kompreneble ni konatiĝas ne nur kun la vivo kaj personeco de Barbosa sed ankaŭ kun la plej gravaj partoj de la brazila historio de lia tempo.

La libro estas esence tre interesa, lia ĝi ŝajnas almenaŭ al mi. Laŭ mi ĝi tamen havas mankon en sia kvalito de prezento al alilandanoj. Ĝi estas verkita por brazilanoj kaj la prezentmaniero havas kiel premison, ke la legantoj bone konas la medion kaj la historion de Brazilo. En si mem tio ne estas manko sed memkomprenebla afero. Sed por ni malproksimaj alilandanoj, kiuj nur nebule aŭ tute ne konas tiun medion kaj tiun historion la tuto restas pli malpli ŝvebanta en la aero. Aliflanke: por pensovigla kaj pacienca persono estas interese kaj el certaj vidpunktoj eĉ avantaĝe tiamaniere, sen helpo de peranto, eniri rekte en alian medion kaj alian historion.

Jozefo Joels faris la tradukon. Ĝi estas bona kaj zorge farita kaj konservas la elokventon de la origina lingvo.

Prezo estas montrita nek sur la libro nek sur la slipoj, kiuj akompanas la recenzajn ekzemplerojn. Ne estas indikite, kie oni povas mendi ĝin, sed mi supozas, ke de Brazila Esperanto-Ligo.

En sia antaŭparolo al la traduko la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo esprimas espron kaj fidon, ke la esperantistoj en ceteraj landoj plezure akceptos la verkon. Estu tiel!

S. E.

Francisco Cândido Xavier: Antaŭ du mil jaroj.
Trad. L. C. Porto Carreiro Neto.
Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio,
Avenida Passos 30, Rio de Janeiro.
Prezo 40 kruzeroj.

F. C. Xavier estas la fama brazila mediumo, kiu ĝis nun peradis 41 beletrajn, historiajn kaj sciencajn verkojn diktitajn de spiritoj. Ankaŭ tiu ĉi romano do ne estas verkita de Xavier sed nur redonita psikografie. La tradukinto komunikas en antaŭparolo, ke la vera aŭtoro estas Emmanuel, unu el la Superaĵ Spiritoj, kiuj nun gvidas Brazilon, sub la Ĝenerala Direktado de alia spirito. Antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj li nomiĝis Publius Lentulus kaj estis roma senatano. Li kaj lia familio transiris al Palestino kaj loĝis tie dum sufiĉe longa tempo. Iliaj unuaj jaroj tie estis la tempo, kiam predikis kaj agadis kaj poste mortis Jesuo. Jesuo sanigis lian filinon, kaj cetere forte influis al la familio, precipe al la edzino, sed Publius forte kontraŭstaris, ĝis li post jardekoj konvertiĝis. (Emmanuel diras, ke la morto de Jesuo okazis en la jaro 33. Ĉiuj historiistoj, astronomoj kaj aliaj tempokalkulantoj asertas, ke Jesuo naskiĝis kelkajn jarojn antaŭ la komenco de nia tempokalkulo, do ke oni iom eraris, kiam oni kreis ĝin. Laŭ tio la morto de Jesuo estis jam okazinta, kiam Publius Lentulus venis al Palestino. Sed verŝajne Emmanuel sekvas la kalkulmanieron, kiu ĝis nun estis ordinara, identigante la vivotempon de Jesuo kun la unuaj 33 jaroj de nia tempokalkulo.)

El la homoj en la rakonto, ĉefe romaj, la pli multaj estas malmoralaj aŭ alie malbonaj. La konfliktoj estas grandparte seksaj kaj tre similas al tiaj konfliktoj en nia tempo, kun la escepto ke en tiuj lastaj ordinare mankas la spirita, kristana

vivkoncepto, kiu en la rakonto de Emmanuel kontraŭagas la malbonon. Kaj troviĝas multe da aliaj dramcaj situacioj. Pro tio verŝajne multaj legos la libron kun granda intereso, kaj certe ĉiuj konsentos pri la doktrino de kristana amo.

Sed por esti honesta mi devas aldoni, ke la libro ne ravas min. La aŭtoro parolas pri la homoj kaj pri la okazado, kaj mi aŭdas la vortojn kaj imagas kaj la homojn kaj la okazadon, sed la homoj ne fariĝas vere vivaj, ili estas kvazaŭ marionetoj, kaj la okazado estas kvazaŭ maŝinca. Mi neniam sentas, ke tiu aŭ tiu homo aŭ okazo nepre estas tia kaj ne povas esti alia, ili estas faritaj kvazaŭ nur el vortoj. La lingvo estas tre ŝarĝita per adjektivoj kaj aliaj nenecesaj vortoj kaj la rakonto per multe da nenecesaj detaloj. Ĝi estas bonintenca romano en la stilo de proksimume la meza parto de la pasinta jarcento, t. e. tiu stilo, kiu estis konvena por amaso da legantoj. El literatura vidpunkto ĝi apenaŭ estas mezbona. Sed kial nepre postuli altan literaturan valoron? Nu, kial alttendenca instruado okazu en formo de diletanta romano? Verdire diras Emmanuel en intima komuniko, ke "mi kiom eble klopodas, por konformigi tian antikvan historion al la gusto de la esprimoj de la hodiaŭa mondo". En tio li similas al multaj nuntempaj aŭtoroj, sed la metodo ŝajnas al mi dubinda.

Precipe unu punkto en la estiĝo de la libro impresas al mi strange. Emmanuel diris iom antaŭ la komenco de la diktado, ke li bezonas la permeson de Dio kaj Jesuo, kaj poste li diras, ke li faras la laboron kun la helpo de Jesuo. Jesuo certe ne malpermesus al homoj, kiuj ŝatas tion, distri kaj edifi sin per tiaj rakontoj. Sed ke tiu, kiu faris la predikon sur la monto kaj la paroladon kontraŭ la fariseoj kaj la skribistoj kaj rakontis la parabolojn, kiu "instruis ilin kiel havanta aŭtoritaton, kaj ne kiel iliaj skribistoj", ke tiu estus helpinta en la verkado de tiu ĉi romano, tio estas absurda. Kaj mi estas konvinkita, ke li dirus, ke la sekvanta priskribo de li en libro enhavas pli da materia ligiteco ol da spirito: "...juna viro, tra kies okuloj, profunde dolĉaj, vidiĝis serena, nedifinebla beleco. Longaj, silkecaj haroj garnis lian kompateman mienon, kvazaŭ brunaj fadenoj apenaŭ origitaj de nekonata lumo. Dia rido samtempe

montranta grandegan bonkorecon kaj strangan energion, elradiigis el lia melankolia, majesta figuro ian nerezisteblan forton." Tuta libro da tiaj priskriboj dirus al ni neniom pri Jesuo, sed en la evangelioj duona paĝo aŭ ec kelkaj linioj sufiĉas, por ke ni povu klare percepti lian spiriton.

La lingvo en la traduko estas bona.

S. E.

Reinhold Conrad Muschler: La nekonatino.
Trad. Ludwig Goppel.
Eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg.
Germ.
Prezo 2 gmk broŝ., 3 gmk. bind., 10 % por afranko.

La libro estas 66paĝa, kun bona papero, bona tipografio, plaĉa. Estas fantaziŝpinita novelo — amrakonto — pri "la knabino el Seine". Dudekunujara senparenca knabino, kun iomete da kapitalo, ĉiam vivinta en la sama loko en suda Francujo, deziras vidi iom pli de la mondo kaj, la ĉefa afero, iri al Parizo por serĉi sian ĝustan lokon en la vivo. En Marseilles ŝi hazarde sur la strato faras servon al juna diplomato kaj lia fianĉino kaj konatiĝas kun ili. La fianĉino iras al Egiptujo por aranĝi domon tie por si kaj la estonta edzo. La fianĉo devas reiri al Parizo por finaranĝi, antaŭ ol li forlasos la postenon tie. Li ekscias pri la planoj de la knabino kaj invitas ŝin kunveturi en lia aŭto. Dum la veturo ekĝermas en ŝi amo al li, amo kiu kreskas kaj kreskas. Verŝajne li amas ŝin pli malpli, sed tion la aŭtoro ne indikas klare. Ŝi pasigas kelkajn tagojn en lia domo en Parizo, tute dece. Ili interparolas, promenadas, vizitas restoraciojn. Ŝia amo kreskas kaj kreskas. Sed jen iun matenon li forveturas al Egiptujo. En la vespero de la sama tago ŝi en amekstazo iras en la riveron. "Ŝia vizaĝo, glorigita, ridetis, klam oni trovis ŝin."

En la libro troviĝas informo, ke ĝi el la germana originalo estas tradukita en ok lingvojn; la esperanta traduko do estas la naŭa. Ke oni tiom ŝatas ĝin devas dependi de ĝia romantiko sed ne de literatura valoro. La personoj ne estas vivaj. La aŭtoro provas komprenigi al ni, ke ili sentas kaj pensas, sed almenaŭ mi neniam sukcesas percepti la sentojn en ili, nur la

komprenigojn de la aŭtoro. La rakontmaniero estas esence epika, kaj tio estas merito, sed ankaŭ epika stilo devas doni vivajn homojn. Merito estas ankaŭ la koncizo, li estas ŝparema pri vortoj kaj detaloj kaj rakontas simple kaj senafekte. La esperanta lingvo estas bona.

S. E.

Lanti: Manifesto de la sennaciistoj kaj
Dokumentoj pri sennaciismo.
Dua eldono reviziita kaj kompletigita.
Eldonis SAT, Paris.
Prezo broŝ. 0,50 dol., tolbind. 0,70.

La ideoj prezentitaj de Lanti meritas seriozan pripensadon kaj kiel eble plej objektivan prijuĝon de ĉiuj esperantistoj kaj cetere de kiel eble plej multe da homoj. La problemoj, kiujn ili traktas, estas realaj kaj ne eviteblaj.

Almenaŭ ĉiuj esperantistoj kaj certe la pli multaj homoj en la mondo aprobas lian celadon al forigo de militoj kaj al socia justo. Ili ankaŭ konsentas pri la rilato inter nacieco kaj militoj. Sed poste la konceptoj estas diversaj. Lanti pretendas, ke ĉio, kio troviĝas en la nocioj nacio kaj nacieco, estas malbona kaj nepre foriginda: "Ni rigardas sekve reakcia la politikon, kiu konsistas en prediko pri sendependeco de nacioj, pri memstareco de popoloj, pri konservo de moroj, kulturoj kaj lingvoj naciaj." Certe, ĉio, kio troviĝas en la nocioj nacio kaj nacieco estas uzebla por instigi militon. Sed ĉu ĉiuj el tiuj aferoj estas en si mem malbonaj kaj militokrea? La rimedo por Lanti estas uzo kaj propagando de esperanto kaj propagando de sennacieco kaj sennacieca klasbatalo. Konsiderante kiaj ni homoj ordinare estas kaj kiom da ni troviĝas sur la tero, ni povas demandi, ĉu tiu rimedo sufiĉos. Alia demando: Se ni konsentas liberon kaj memstarecon al la individuoj sub la kondiĉo de reciproka respekto — ĉu ne estus logike sub la sama kondiĉo konsenti liberon kaj memstarecon ankaŭ al komunecoj de homoj?

"Nacioj ekzistas ... regnestroj, ambasadoroj, generaloj kaj similaj parazitoj profitas ilian ekziston — simile al kuracistoj, kiuj havas komfortan vivon dank' al la ekzisto de malsanuloj." — "Ĉiu regnestro estas potencavida kaj sekve ĉiam deziras

pligrandigi sian regnon." Tia profitado ekzistas, tia potencavido ekzistas, sed ĉu la asertoj estas objektivaj formitaj? Tiuj oficuloj — krom verŝajne la kuracistoj — ne restus en tutmonda unuo, sed ĉar Lanti deziras tutmondan centrigon de la socia gvidado, nepre aperus novaj oficuloj por la direktado. Ĉu profiteco kaj potencavido ne povus ekzisti ĉe ili?

"La nacioj ekzistas por la registoj kaj la regaspirantoj kaj per la amaso da naivaj patriotoj." — Se tiu aserto estas objektiva, ne ekzistas veraj asociaj komunecoj, nur potencregado kaj potencregatoj. Ĉu efektive estas tiel?

"La homaro ne ĝuos pacon, tiom longe, kiom la regavido ne estos bridata ĉe la homoj." Pri tio ĉiuj konsentas, eĉ la regavidaj. "En sennacieca mondregno la organizproblemo ne plu estus politika, sed teknika. La teknikuloj estus elektataj per konkurso, kontrolata de samfakuloj. Kaj la problemoj tiam solvendaj estus kiel eble racie utiligi la riĉaĵojn de nia planedo profite al ĉiuj homoj senescepte." Ĉu la anstataŭigo de politika organizproblemo per teknika aŭtomate forigus regavidon? Ĉu potencavido estas kvalito de la organizformo sed ne de la homoj? La lastaj vortoj de la citaĵo, "kiel eble plej racie utiligi la riĉaĵojn de nia planedo profite al ĉiuj homoj senescepte", absolute kongruas kun la kooperativa movado, sed tiu ne estas klasbatalo.

La supraj linioj ne estas debata komento. Mi volas nur montri, ke tiuj gravaj problemoj estas traktataj en la Manifesto kaj ke ilia solvo estas diskutibla kaj grava por ĉiuj.

S. E.

Tiberiu Morariu: Sub la stelo.
Eldono Salex
(Sven Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16,
Johanneshov, Svedujo)
Prezo 0,60 sv. kr.; 0,25 kr. aŭ rpk por afr.

32paĝa kajero kun multobligita skribmaŝina teksto, eldonita okaze de la 50a jaro de la aŭtoro kaj prezentata kiel "senpretenda kolekto da bildoj plejparte el tempo pli idilia ol la nia, pentritaj dum multjara krosado en Eŭropo sub la stelo".

Jarlibro de UEA 1951, dua parto.

Krom raportoj de la estraro kaj de la Akademio ktp la dua parto de la jarlibro enhavas tabelon pri kolizoj de 1952, liston de lernejoj, en kiuj esperanto estas instruata, kaj resuman raporton pri la progresoj de esperanto dum la pasinta jaro.

Mankantaj numeroj de MR serĉataj: 1/1944, 2/1944, 1/1946, 2/1946, 4/1949. Pago au rekompenco. Dipl.-Ing. Horst Michling, Steinbergstr. 1, Hannover — Kirchrode, Germanujo.

Se vi trovas, ke Malgranda Revuo meritas disvastigon — rekomendu ĝin al amikoj kaj konatoj kaj provu havigi iun novan abonanton!

En diversaj landoj troviĝas samideanoj, kiuj deziras la revuon sed ne povas aboni, parte pro neebleco sendi monon, parte pro ekonomiaj cirkonstancoj. Du usonaj samideanoj pagis en la pasinta jaro por sufiĉe granda nombro da samideanoj, kaj aliaj pagis por eksterlandaj leteramikoj. Se vi povos tiel donaci abonon, vi helpos kaj al samideano kaj al la stabiligo de nia revuo. Prefere elektu mem la ricevonton, sed se vi tion ne povas, mi havas longan liston kun nomoj de fidelaj legantoj, kiuj ne povas aboni.

S. Engholm